FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT L' Oazo B. P. 54 49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59000 LILLE
Peranto I.K.U.E.: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la nº: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotizo: 7 F. Sume: 30 F. ====

++

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent mepre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

++

==== Nº 153 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== JUNIO 1987 ====

++

BILETO DE LA PREZIDANTO

Ceux d' entre vous qui ont participé à la rencontre de Bagneux ont témoigné de la chaude ambiance qui a régné parmi nous en cette accueillante Maison Diocésaine. Repas pris joyeusement dans la vaste salle à manger habillée de boiseries, réception et service aimables d' un personnel dévoué, charme d' un parc fleuri dominé par la haute stature d' un magnifique cèdre, tout inclinait chacun de nous à la paisible et amicale communauté de pensée. Et la participation quotidienne à l' Eucharistie, présence permanente du Christ parmi nous, faisait de nous une communauté de disciples attendant la Pentecôte.

En effet, le thème proposé par le Père Bourdon, et centré sur l' action de l' Esprit Saint dans nos vies de chrétiens, et principalement dans notre comportement d' espérantistes ouverts à l' universalité des humains, a bien été entendu et réfléchi. Une méditation collective, par "ateliers", puis conclue par l' ensemble, nous a aidés à saisir comment la pratique d' une langue qui tend à l' entente des peuples prenait un sens chrétien, dépassant son aspect matériel de moyen de communication pour s' élever, avec l' aide du Saint-Esprit, à la continuation de l' action des premiers envoyés, en faisant des efforts pour le rapprochement fraternel des peuples et des races, dans le soutien spirituel et matériel des plus éprouvés, dans l' union au Créateur par la prière et le service.

Nous avons vécu ensemble, vétérans et débutants, dans une pratique de la langue qui a permis aux moins expérimentés d' entre nous de dominer la timidité et de se lancer dans son usage dans les diverses occasions de la vie quotidienne, et au plus jeune déjà acquis à cette pratique, d' apporter sa note d' humour à nos moments de détente, détente qui nous a emmenés en promenade dans le magnifique que parc de Sceaux, fleuri et ensoleillé, où le musée d' Ile-de-France a été visité avec le plus vif intérêt.

../...

La pensée de nos adhérents absents, l' espoir de nous retrouver avec eux l' an prochain, nous conduit à évoquer notre projet pour 1988: LOURDES. Il est trop tôt pour en donner le détail, mais nous espérons réaliser, une fois de plus, le pèlerinage au sanctuaire de Notre-Dame. Notre mouvement s' est placé sous la protection de la Mère de Dieu, et notre fondateur, Emile Peltier, ce prêtre dont nous continuons l' oeuvre, souffrant du mal qui l' a emporté, est venu mettre ses derniers moments et la suite de son action entre Ses mains. Son corps repose dans le vieux cimetière où sa sépulture vient d' être rénovée, et devrait être pour IKUE un lieu du souvenir.

En 1914, le Congrès Universel devait avoir lieu à Paris, et, à sa suite, un pèlerinage international avait été organisé. La déclaration de guerre vint brusquement tout interrompre. Nous souhaitons que, en 1988, ce pèlerinage de la Paix soit aussi international, et témoigne des voies de la compréhension, de l' unanimité ouvertes par la communication à l' aide d' un langage commun.

Autre grave question: comment attirer à nous la jeunesse? Il existe beaucoup de groupes chrétiens: cercles, scoutisme, sports etc. Quels moyens avons-nous de les pénétrer? Comment provoquer chez eux l' intérêt aux relations internationales? Comment créer d' un pays à l' autre ce besoin de se comprendre, de communiquer, de se rencontrer? A vous, chers amis, d' apporter une réponse.

R. Cl. COLAS

RESUMO

La ĉi-jara kongreso de la Franca Katolika Esperanto-Asocio ĵus okazis en la pariza antaŭurbo Bagneux. La etoso estis varme amika kaj frata, kaj la ĉeesto de Kristo inter ni, en la ĉiutaga partopreno en Eŭkaristio faris el ni komunumon kvazaŭ pentekostan.

La temo proponita de P-ro Bourdon,"la agado de la Sankta Spirito en nia vivo de kristanoj kaj de esperantistoj", estis enprofundigita en komuna meditado. Unu sama lingvo povas, kun la graco de la Sankta Spirito, fariĝi ilo de fratexniĝo, en la kunhelpo kaj solidareco inter la popoloj kaj la rasoj, se oni konsideras ĉiujn homojn kiel egalajn filojn de la Kreinto, destinitajn al la sama savo.

Junaj, novaj esperatistoj trapasis tiujn tri tagojn en la praktiko de la lingvo, kaj eĉ komencantoj kuraĝe provis sian kapablon kaj ekzercadis sin apud veteranoj kaj lertaj praktikantoj, ĉu en seriozaj momentoj, ĉu en gajaj distroj kaj promenado en la belega parko de Sceaux, kaj ni agrable ĝuis tiujn horojn.

Ni ankaŭ pritraktis nian venontan kongreson en 1988: pilgrimo al Lourdes kie nia fondinto Emile Peltier metis siajn lastajn tagojn kaj sian agadon en la manojn de la Sankta Dipatrino. Ni invitas niajn samideanojn el ĉiuj landoj partopreni en tiu pilgrimo dediĉita al la Paco; ni memoru, ke, en 1914, la Universala Kongreso kaj postkongresa pilgrimo de la katolikoj ne povis okazi pro la eksplodo de la mondmilito.

Ni finas per alvoko al la junularo, kaj al tiuj, kiuj povas penetri la katolikajn rondojn, kaj interesi la geknabojn kaj gejunulojn al la plezuro de internaciaj rilatoj.

R. C. C.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

PRI LA KONGRESAJ LABOROJ

Sub la gvidado de P-ro Bourdon, la kongresanoj formis grupetojn por pritrakti la temon proponitan:"Rolo de la Sankta Spirito en nia esperantista vivo"

- Kiu estas la Sankta Spirito? En unu sola Dio, esence unika, Kristo rivelis la tri personojn, kiuj, kunvivante en sama amo, agas sur la kreitaĵaro, kies frukto kaj objekto estas tia amo. Rilatoj inter la homaro kaj la dieco, efektiviĝis per la promesoj de la antikva elekto de popolo de Dio, per la savo, per la kruco kaj reviviĝo de Jesuo, kaj per la sendo de la Spirito, kiu alportis al ni la ardigon kaj la lumon antaŭ la diaj misteroj. La Spirito de Dio kondukis la homan personon de Kristo en la eventoj de Lia tera misio.

- Per la preĝo, en ĝiaj diversaj formoj: peto, danko, kontemplado, ni metas nin sub la helpanta influo de la S-ta Spirito, kiu inspiras nin kaj helpas nian malforton en la vojo al Dio.

../...

En la esperanta movado, ni situas nian agemecon sur la tereno de la homa frateco, kumfrateco, kunrespondeco; sed, kun la helpo de la S-ta Spirito, en nia kristana vivo, ni plialtigas tiujn agojn sur la nivelo de la plano de Dio. Kiel? En la preĝo ni komunikas kun la fonto de la graco, ĉu akceptante, ĉu petante, ĉu submetante.

La diversaj karismoj estas la formoj de la donoj de la S-ta Spirito, ricevitaj en la sakramento de la Konfirmacio, kaj akceptataj en ĉiuj cirkonstancoj de la vivo. Ili konkretiĝas en niaj rilatoj kun niaj samuloj, per socia helpo, solidarecaj agadoj, helpo kontraŭ la malsato, strebo por konstrui justecon kaj pacon, propra konvertiĝo kaj apogo al la sociala konvertiĝo. En tiuj formoj de laboro, la ideala instrumento de komunikado, Esperanto, povas, devas helpi al la disvastiĝo sur la tuta tero en la servo de la S-ta Spirito.

Venu S-ta Spirito, satigu la korojn de viaj fideluloj, ardigu ilin per la flamoj de via sankta amo.

R.C.C.

AGADRAPORTO 1986

Kiel ĉiujare, mi devas raporti pri la vivo de nia asocio, kies tre modesta prezidanto mi estas jam de multaj jaroj.

Dank! al la sindono de la komitatanoj, tre agemaj, ne nur en nia asocio, sed ankaŭ en la ĝenerala movado, la agado favore daŭras.

Ne ĉiujn mi povas citi, sed mi devas gratuli ĉefe S-inon Vincent, spertulinon en la lingvo, senlacan redaktorinon de la bulteno, kaj Fraton Marmou, ties presiston kaj dissendanton. Ankaŭ al la sendantoj de interesaj artikoloj iras mia danko.

La centra oficejo ĉe "la Cerisaie" gastigas nin por niaj komitatkunvenoj kaj mi petas S-ron Despiney akcepti kaj transdoni niajn dankojn. Memoru, ke nia saĝa komitatano alportas al U.F.E. estimindegan laboron en sia ĉiutaga deĵorado ĉe ties oficejo.

Al S-ro Lafargue kaj al liaj kunlaborintoj mi esprimas la bonegan memoradon de la partoprenintoj en la kongreso en Nantes 1986. Tiam, sub la gvidado de P-ro Bourdon, ni meditis pri la misio donita de Kristo al Siaj disĉiploj: iru al ĉiuj popoloj, prediku la Evangelion ĝis la ekstremoj de la tero.

P-ro Degrelle estas je nia dispono por ricevi kaj transdoni la abonojn al "Espero Katolika" kaj la aliĝojn al I.K.U.E. Li faris ankaŭ valoran laboron, tradukante kantikojn por riĉigi nian liturgian trezoron.

Mi substrekas la utilecon de sendado de leteroj aŭ artikoloj al diversaj revuoj, ekz. "Témoignage chrétien" enpresis leterojn de legantoj, kaj sekve mi ricevis informpetojn.

Estas nun tempo por pensi pri la estonto; ĉiu el niaj anoj iĝu agema, kontaktu homojn, kiuj povas alporti helpon, subtenon por disvastigi, per gazetartikoloj, kursoj, prelegoj, personaj rilatoj, la famon kaj praktikon de Esperanto. Agu en viaj rondoj, ĉefe apud la junularo; tia agado estu alloga, gaja, interesa, amuza, luda. Inspiru la deziron plivastigi la rilatojn trans la landlimojn. Inter junaj kristanoj naskiĝu formo de rilatoj, samkonfesiaj aŭ ekumenaj, kiu estos manifestado de la frateco en la kristana amo.

R.C.C.

PROTOKOLO DE LA ĜENERALA KUNVENO EN BAGNEUX LA 2-an DE MAJO 1987

9.30: malfermo fare de S-ro Colas en la dioceza domego "La hipokaŝtanoj". Li bonvenigas la 20 ĉeestantojn kaj invitas ilin al la uzo de Esperanto dum la tuta kongreso.

F-ino Preux, sekretariino, prezentas la senkulpigojn de S-ro Amouroux, S-ino Cheverry, S-roj Lecocq kaj Villeneuve.

S-ro Colas prezentas la agadraporton (v. supre). Debato sekvas pri la rimedoj trovotaj por atingi la junularon: P-ro Bourdon sugestas publikigon de allogaj paĝoj por junuloj en la bulteno; S-ro Degoul opinias, ke oni devas uzi aliajn revuojn, ke la problemo ne estas fari specialajn paĝojn, sed formi junulgrupon, kiu mem zorgos pri tio. Li sugestas atingi tion pere de I.K.U.E. P-ro Bourdon insistas pri specialaj paĝoj kaj sin turnas al la skolta movado. S-ino Vincent substrekas, ke la bulteno estas malfermita al ĝejunuloj.

Tiu raporto estas unuanime aprobita.

../...

Financa raporto (v. martan bultenon) Ĝi estas unuanime aprobita, minus 1 sindetemo; oni gratulas la kasistinon, kiu donas precizigojn, ĉefe pri la dumviva membreco, kiu povas esti renovigita, kiel iuj jam faris.
Balotado: oni reelektas la 4 kandidatojn: S-inoj Michau kaj Vincent, F-ino Preux kaj S-ro Lafargue. Ĉiu ricevas 25 voĉojn.
La asocio kaj la bulteno: S-ino Vincent opinias, ke FKEA, kiel faka asocio, funkcias tiel bone, kiel iuj aliaj. La rilatoj inter la anoj estas tre bonaj. Ŝi nur bedaŭras, ke neniu skribas pri familiaj, religiaj, esperantaj eventoj. Sed aliaj asocioj spertas la saman inertecon.
S-ro Degoul samopinias; P-ro Bourdon insistas pri pli vivanta bulteno. S-ino Vincent dankas pro la senditaj artikoloj, kaj la prezidanto emfazas, ke la bulteno situas sur la ĝusta vojo.

S-ro Colas legas la leteron senditan al M-ro François Favreau, episkopo en Nanterre, okaze de la kongreso, por prezenti la asocion. La ĉeestantoj alte taksas la taŭgan enhavon. M-ro respondis per kuraĝiga letero kaj certigis pri siaj preĝoj. La prezidanto demandas, ĉu oni kontaktu aliajn homojn.
S-ro Bessière proponas, ke oni sendu la bultenon dum unu jaro al la episkopo de la kongresloko. Aliaj sugestas la sendon de artikoloj pri la kongreso al la dioceza gazeto antaŭ la kongreso. Oni opinias sendon de leteroj al ĉiuj episkopoj tro multekosta kaj senutila.
Varbado: oni ne sufiĉa informas pri la ekzisto de nia asocio en la Esperanto-gazetaro. S-ino Vincent opinias, ke la plej bona medio por varbado estas "Grésillon". Multaj opinias, ke la amikaj rilatoj plej efikas. S-ro Despiney parolas pri la rolo de la sidejo de U.F.E.
KONGRESO 1988: Lourdes de ĵaŭdo 7-a ĝis lundo 11-a de aprilo en "Domo de l' Assomption", kiu povos akcepti maksimume 25 homojn; la laste aliĝintoj loĝos en hotelo "Panoramic". Tiu renkonto estos internacia pilgrimo.
I.K.U.E.-"Espero Katolika": la prezidanto sendos artikolon al IKUE pri Lourdes. S-ino Vincent bedaŭras la mankon de informoj pri la IKUE-kongreso en Ĉenstoĥovo. EK tamen sendis aliĝilon kaj publikigis kelkajn liniojn.
S-ro Bessière atentigas pri la alvoko al kandidatoj por la postenoj de prezidanto, estrarano, plenumkomitatano)
DIVERSAĴOJ: P-ro Bourdon anoncas, ke la pilgrimo en Banneux okazos la 12-an de septembro 1987. Oni preĝos en Esperanto por la malsanuloj.
Kongreso 1989: venis invito el Nevers, de F-ino Vanneau. En la monaĥejo St-Gildas fine de aprilo, komence de majo.
Ekumena centro en Jerusalemo (P-ro Bourdon): por kunligi hebreojn, kristanojn, muzulmanojn. La uzo de Esperanto estas necesa, sed la respondeculo ne favora. Pilgrimo tien helpus...
UFE-kongreso en St-Raphaël: P-ro Bourdon diservos dimanĉon 7-an de junio je la 18.00 en la kongresejo mem.
12.00: la prezidanto fermas la ĝeneralan kunvenon.

KOMITATKUNVENO

La komitato kunvenas tuj poste kaj unuanime reelektas la saman estraron.
La venonta kunveno okazos en Paris la 18-an de oktobro.

Protokolis: R. PONS

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

NEKROLOGO

Ni priploras la forpason de André RIBOT, dumviva membro. Li mortis en Marmande en aprilo 70-jara. Instruisto pri lingvoj, li havis grandan sperton en tiu fako, kaj verkis lernolibrojn pri Esperanto: Nos premiers pas en Esperanto, Précis grammatical, Ni parolu en Esperanto, Tra la mondo (kun disko aŭ kasedo), Preparado al la Atesto pri Kapableco. Li reeldonis Zamenhof-verkojn: Fundamento de Esperanto, Lingvaj Respondoj, Hamleto, Marta, vortaron franca-esperanta de Léger-Albault k.a. Bedaŭrinde, li iĝis preskaŭ blinda kaj devis rezigni pri plua instruado en Grésilon kaj pri eldonagado.

Ni kondolencas al lia edzino kaj preĝas por la ripozo de lia animo.

Li restos por ni modelon de sincera kaj sindona homo, kaj de bonega kursgvidanto.

* * * *

...\..

BALAFONO? AFRIKA MUZIKILO

En franoparolanta Afriko, oni nomas balafono (el la mandigva lingvo: mbalafo) ksilofonon, komplikan sed tre melodian perkutinstrumenton.

La klavaro de la klasika senufa ksilofono konsistas el dekdu lignaj lamenoj. La nombro de iliaj vibroj varias laù la larĝeco kaj dikeco. Pro tio, ĉiu el ili malsimile sonoras laù sia amplekso. La oktavo sonoras per regula tona malkresko ekde la alta tono de la plej malgranda klavo, situanta dekstre de la ludanto. Ĉe la ekstremo, ĉiu lameno estas aparte kunligita sur la du laùlongaj tigoj de rektangula framo. Dekdu sferaj nekovritaj kalebasoj, je granda volumeno, estas muntitaj laù du vicoj en la malsupra duono de la framo; ili pligrandigas la noton de la lameno al kiu ĉiu respondas.

La konstruanto, laborante en izola veprejo, agordas la novan muzikilon per bonega modelo.

La perkutado okazas per du bastonetoj aù marteloj (unu por ĉiu mano) kun pintofino rondigita per arba mola latekso por mildigi la frapadon.

Laù la melodia vidpunkto, la ksilofonoj, identaj unu kun la aliaj, donas la samajn notojn. En normala orkestro de tri muzikistoj, la ĉefo komencas arion, kiun ripetas la dua kaj daùrigas la tria. La plureco de arioj donas ampleksan repertuaron: distraj dancoj, funebraj ceremonioj, kolektiva laborado havas siajn proprajn ariojn.

El P. Knops, sma (La malnovaj senufoj)

++

NORVEGUJO (daùrigo)

La komerca norvega floto, "la flosanta norvega imperio", kiel oni nomas ĝin, estas karakterizita de la kompetenteco de siaj maristoj kaj de la alta teĥnika nivelo. Fakte ĝi estas tre moderna pri konsisto kaj ekipo. La duono de la ŝipoj aĝas malpli ol 4 jarojn kaj prekaù 90% malpli ol 10 jarojn.

Tiu floto estas unu el la plej gravaj en la mondo. La ŝipoj estas regulaj gastoj en havenurboj en la tuta mondo. Ili estas bone ekipitaj per gruoj kaj aliaj maŝinoj, kiuj garantias rapidan kargadon kaj malkargadon en haveno. Speciale konstruitaj ŝipoj transportas nafton, aùtomobilojn, mineralojn, likvan gason, cementon kaj fridigitajn nutraĵojn.

La sistemo de socialaj kaj bonfartigaj aranĝoj por la maristoj ne ofte trovas egalan en internaciaj rilatoj.

Ankaù la fiŝado estas grava ekonomia aktivaĵo en Norvegujo por la hejma merkato kaj por la eksportado, ĉefe por la distriktoj de norda Norvegujo.

Estas tamen klare, ke la rezervoj ne toleros senliman ekspluatadon. La konservado de la fontoj iĝis grava temo en la oficiala fiŝpolitiko. La fiŝisto ne nur devas koni la migrajn movojn de la fiŝoj, sed ankaù esti taùga maristo. Pli ol 20 000 fiŝŝipoj estas registritaj en Norvegujo. La plimulto estas malgrandaj, sed multaj estas modernaj kaj praktikas la fiŝadon en vastaj areoj de Atlantiko ĝis Novtero kaj Groenlando.

La kaptitaj fiŝoj: moruo, maloto, haringo, skombro, merlango... estas liverataj al la industrio de la fiŝprilaboro. Tie laboras virinoj, kiuj tiel havas regulan okupon en la marbordaj distriktoj. Multaj uzinoj estas kooperativoj kondukataj de la fiŝistoj mem. Pli ol 90% el la fiŝkaptaĵoj estas eksportataj (fiŝpulvoro, fiŝoleo, frostigitaj kaj salitaj fiŝoj).

La agrikulturo devas parte fronti al malfacilaj topografiaj kondiĉoj, parte batali kontraù malfavora klimato. Tamen ĝi estas alte produktiva dank' al raciaj ekspluataj metodoj. La kultivebla tero troviĝas en la valoj, kie oni kulturas terpomojn kaj tritikon. Sed la klimato signifas, ke la kreska periodo estas iom mallonga kaj multaj kreskaĵoj ne povas esti kultivataj. Pro tio la bestbredado okupas superan pozicion. Entute 40% el la nutraĵa konsumo en la lando estas kovrata per la produktoj de la norvegaj farmbienoj. Praktike, la posedantoj mem mastras siajn bienojn. Same kiel en la aliaj fakoj de la norvega ekonomio, la agrikulturo havas kooperativojn por vendado kaj produktado, ankaù por la kredito. La ŝtato apogas la agrikulturon per subvencioj laù interkonsento kun la ĉefaj bienulaj organizaĵoj. La celo estas sekurigi la bienulon kaj garantii al li enspezojn egalajn al tiuj de industria laboristo.

(daùrigota)

* * *

Novaj membroj 1987: 3) F-to LAVARENNE (Hte-G); 4) S-ro SLATYNSKI (Pollando); 5) S-ino SICOT (M&L); 6) S-ro LEBRUN (Eure)
Koran bonvenon al ili!

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

KELKAJ INFORMOJ

1) Nova Esperanto-strato en Francujo! Amase skribu gratulleteron al: Magistrato d' Eysinos pere de Gisèle GIZARD 39, av. de St-Médard 33320 EYSINES.

2) Unua Kristana Kultursemajno Esperantista (26-30/10/1987); detalojn sendas: Kultura Centro Esperantista Pf. 771 CH-2301 LA CHAUX-de-FONDS SVISLANDO.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

ENHAVO

1.2. Bileto de la prezidanto
3. Pri la kongresa laboro
Agadraporto
3.4. Protokolo de la ĝenerala kunveno (2/5/1987)
Nekrologo
5. Balafono, afrika muzikilo
Norvegujo
6. Nia membraro
Informoj
Kotiztabelo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

KOTIZTABELO 1987

IKUE kun "Espero Katolika"	90 F
Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.	

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" (individuo)	30 F
Geedza paro	40 F
Infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o	15 F
Bonfaranto	150 F
Dumviva membro	600 F

UFE kun "Revue Française"	195 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro	200 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Dépôt légal: 2ème trimestre 1987 !! Polycopié par l' A. C. F. E.

C.P.P.A.P. nº 62 532. !! Prieuré St-Martin

Directeur: René-Claude Colas !! La Houssaye-en-Brie

Directeur-délégué: !! 77610 FONTENAY TRESIGNY

René-Jean Marmou !! FRANCE

* * * * * * *

* * * * *

* * *

*